



未摘花(すえつむはな)

新作狂言

登場人物: 光源氏、大輔の命婦

光源氏「是は隠れもない色好み、光源氏で御ざる。正妻の葵の上は私に冷とう御座れば、六条の御息所様に通いますが、亡くなられた皇太子の未亡人だけあり、氣位が高く迷惑して御座る。かわいい紫は氣だてもよう御ざれど未だ子供、恋の相手にはなりませぬ。いかがいたしたもので御座ろう… いや、恋のことは、経験豊富な命婦どのにきけばよい。命婦どの、御座るか、御座りますか。」

命婦「わらわを呼びやったは光源氏の君か。何(なに)と思ふてお呼びやつたぞ。」

光「私は世に知られた色好みで御ざるが、正妻の葵の上も、私が通う六条の御息所様も、最近私に冷とう御ざる。いや、恋のことならご経験豊富な命婦どのにきけばよいと思ひ至りました。どなたか、やんごとなく、教養ある女人に通いたう御座る。」

命「光の君、わらわが経験豊富とは、どういう意味で御座りましょう。わらわの悪いうわさを流す上達部(かんだちめ)があるとは聞き及びましたが、よもや光の君のことでは御座りますまい。」


光「いやいや、私は命婦どのを褒めこそすれ、けなすことは御座ない。経験豊富とは、よく歌を詠み、漢籍をもそらんぜらるということで御座る。さぞかし教養ある女人を御存知であろう。」

命「それならば、よう御座る。やんごとなき女人を知らぬことは御座りませぬ。さりとて、光の君は先(さき)の帝(みかど)の皇子(みこ)で御座ります。臣籍降下なされ、源氏の姓(かばね)をいただいたとはいえ、人のそしりを受けぬことが肝要で御座る。うわさでは、上達部が下々の女を崇りある廃院へ連れ込み、親のない幼子をさらいます。」

光「それは、けしからぬことで御座る。仏罰が降るであろう。」

命「まこと、仏罰が降りましようぞ。京を逃れて須磨や明石で果てた京人(みやこびと)もあると聞き及びます。」

光「いい気味でおりやる。」



命「さて、常陸の宮様の姫君、未摘花(すえつむはな)様は御存知か。」

光「おお、琴(きん)の琴の手練と聞いた。」

命「古琴のてだれで御座る。やんごとなき姫君



Kartamo

Noa Komedio nove verkita de

SIMATANI Takesi 2020

Hikaru: Mi estas Hikaru Genĝi, fama amoristo. La edzino Aoi-no-Ue estas malvarma al mi kaj mi havas amatinon Rokuĵoo-no-Mijasundokoro. Ŝi estas vidvino de kronprinco kaj ŝia fiero ĝenas min. Murasaki estas infano, kvankam bonkora. Kiel mi trovu bonan amatinon?... Ha, pri amo mi petu de la Damo, plej sperta pri amo... Estimata Damo, kie vi estas?

Damo: Ĉu min vokis Princo Hikaru Genĝi? Pro kio vi vokis min?

H: Kvankam mi estas fama amoristo, mia edzino Aoi-no-Ue kaj mia amatino Rokuĵoo-no-Mijasundokoro estas malvarmaj. Pri amo mi vidas Damon plej sperta. Mi petas konatigi min al iu sinjorino eminenta kaj bone kulturita.

D: Princo Hikaru, kion signifas la vorto "sperta"? Oni diras al mi, ke iu klaĉas kontraŭ mi. Ĉu vi estas tiu eminentulo, kiu disfamigas min malbona?

H: Ne, mi ne klaĉas, sed ĉiam laŭdas vin. La vorto "sperta" aludas, ke vi versas belajn kantojn kaj parkeras ĉinajn klasikajojn. Vi konas kulturitajn sinjorinojn, ĉu ne?

D: Mi komprenis vin. Certe mi konas eminentajn sinjorinojn. Mi diru: Vi estas princo de la antaŭa Mikado. Kvankam vi descendis al la rango de regato kaj komencis la klanon Minamoto, evitenda estas ĉia riproĉo. Oni diras, ke iu eminentulo delogis virinon al malbenita ruino kaj forkondukis orfan knabinon.

H: Terure, kia monstro li estas! Budho punu lin!

D: Vi pravas! Iam Budho punos lin. Mi scias iun eminentulon. Li devis rifuĝi de Kioto kaj morti en Suma aŭ Akasi.

H: Kia ago, tia pago!

D: Ĉu vi scias la Princinon Kartamo, filinon de Princo Hitaĉi-no-Mija?

H: Majstrino de sepkorda kotoo!

D: Ŝi estas virtuozo de guĉino, kvankam

ゆえ、聞いた者はおりませぬが。」
光「能ある鷹は爪を隠すと申す。」
命「なかなか。」
光「さて、今宵案内してくりょうか。」
命「急で御座るが、案内(あない)いたしましょう。
御ざれ、〜。」
光「参るぞ、〜。」
命「さて、最早着きました。常陸の宮様の屋敷で御座る。」
光「蓬(よもぎ)が生えまする。」
命「まこと、よもぎがおいます。光の君がお世話なされば、昔にも戻りましょう。」
光「お世話いたしましょう。」
命「まず、そこにお待ちください。」
光「心得た。待ちましょう。」
命「頼もう、頼みましょう…いや、ただ一人使う者も去ったとみえた…姫君、ここに御座るか。これを持って参りました。ゆくりと召し上がりながらお聞きください。門の外にやんごとなき皇子(みこ)を待たせて御座る…いやいやでは御座らぬ。姫君はわらわのような宮仕えもかいませんまい。ひとの世話にならずば立ち行きます。なに、父宮の君がご存命ならば…せんないことをいうて泣かれるでない(泣く)…門の外の男は、なんの取り柄もない男で御座るが、ただひとつ、先の帝の皇子で、お逢いなされれば、ひもじいことはなくなりましょう。少しは人を使い、屋敷を昔に戻せましようぞ。よろしいな、そこにお待ち被下(くだされ)…のうのう、光の君。」
光「未摘花様は。」
命「頭の中将様も姫君に懸想されますが、わらわがお話して、光の君と逢うとおしゃれました。」
光「なに、頭の中将様も。それは命婦どの、合力ありがたう御座る。」
命「御ざれ、〜。」
光「通ります、〜。」
命「姫君、皇子(みこ)で御座ります。」
光「光源氏で御座る。不案内で御座る。」
命「姫君、古琴を♪…わらわはもうこう参ります。」
光「さて、逢うたからは御簾を上げ、お顔を見たいもので御座る…これはいかなこと。」
命「これ、光の君、どこへ。」
光「ちと、用が御座る。はないてくれい〜。」
命「はなすことではない。姫君に逢うたからは、そのまま帰るといことが御座るか、やるまいぞ、〜。」 (終わり)

neniu aŭskultis ludon de eminenta Princino.
H: Nobla akcipitro kaŝas ungegojn!
D: Vi pravas.
H: Volu konduki min al Princino ĉivespere.
D: Kvankam tro haste, mi konduku vin... Venu, venu!
H: Mi venas, mi venas!
D: Ni alvenis! Jen la Domo de Princo Hitaĉi-no-Mija.
H: Dense kreskas artemizio.
D: Certe kreskas herboj. Vi povos renovigi la ruinon.
H: Mi renovigos ĝin.
D: Ĉi tie bonvolu atendi min.
H: Bone, ĉi tie mi atendos.
D: Bonan vesperon! Aŭdiencon mi petas!...
Ve, foriris la lasta servisto!... Princino, vi sidas ĉi tie. Mi kunportis frandaĵon. Volu manĝi trankvile, dum mi parolos. Ekster la pordego atendas iu Princo... Abomeno ne konvenas. Vi ne scipovas labori. Sen protektanto vi ne vivtenos... Ve! Ne helpas forpasinta Patra Princo. Ne ploru! (ploras) ... Senvalora estas la viro ekster la pordego. Li tamen estas filo de Mikado. Neniam vi malsatos kun li. Cetere revenos la servistoj kaj li renovigos la Domon. Ĉu vi konsentas? Atendu momenton. Mi alkondukos la Princon... Longe vi atendis, Princo Hikaru.
H: Ĉu la Princino Kartamo?
D: Ankaŭ Too-no-Ĉuujoo amindumas al ŝi. Mi deadmonis kaj ŝi akceptis vidi vin.
H: Ve, ankaŭ Too-no-Ĉuujoo! Mi dankas pro helpo de vi, estimata Damo.
D: Nun venu, venu!
H: Mi venas, mi venas.
D: Estimata Princino, jen venis la Princo.
H: Hikaru Genĝi salutas por la unua fojo.
D: Princino, guĉinon♪... Nun mi foriras.
H: Jam ni estas konatoj. Volu levi la kurtenon... Ve, kia fiasko!
D: Ho, Princo Hikaru, kien vi iras!?
H: Urĝas afero! Lasu min foriri! " !
D: Mi ne lasu vin! Vi jam vidis kaj konas Princinon! Vi ne povas foriri!
Vi ne povas foriri! (fino)

Floras floroj (さくら さくら)

kanto el la lastaj jaroj de la epoko Edo
tradukis SIMATANI Takesi

1) Flo-ras flor', flo-ras flor'
2) Flo-ras flor', flo-ras flor'

en mon-ta-ro kaj kam-par' flo-ras ĉi-e sen kom-par'
sub ĉi-e-lo de prin-temp' flo-ras ĉi-e en e-ben'

Kva-zaŭ nu-boj aŭ ne-bul' blan-kas flo-roj de sa-kur'
Kva-zaŭ nu-boj aŭ ne-bul' blan-kas flo-roj de sa-kur'

Flo-ras flor', flo-ras flor', flo-ras en ple-zur'
Flo-rojn ni, flo-rojn ni vi-dos en ple-zur'

さくら さくら (江戸末期古謡)

1) さくら さくら 野山も里も

見わたす限り かすみか雲か
朝日におう さくら さくら 花ざかり

2) さくら さくら やよいの空は

見わたす限り かすみか雲か
匂いぞ出する いざや いざや 見にゆかん

※曲は江戸時代末期の子供用の箏曲、作者不明。明治期に歌詞が付いた。

2番は1888年発行の東京音楽学校の「箏曲集」に掲載。1番は1941年の改作。


Floras floroj

japana kanto el la epoko Edo
tradukis SIMATANI Takesi

1) Floras flor', floras flor'
en montaro kaj kampar'
floras ĉie sen kompar'
Kvazaŭ nuboj aŭ nebul'
blankas floroj de sakur'
Floras flor', floras flor',
floras en plezur'

2) Floras flor', floras flor'
sub ĉielo de printemp'
floras ĉie en eben'
Kvazaŭ nuboj aŭ nebul'
blankas floroj de sakur'
Florojn ni, florojn ni
vidos en plezur'

※ La dua teksto estas la originalo, kiun oni presigis en la jaro 1888. La unua estas adaptaĵo en 1941.



古琴 guqín, sepkorda kotoo: 中国伝来の七弦琴。琴 (きん) の琴。

琴柱 (ことじ) はなく、13 個の徽 (き) を目印に左手で弦を押さえ、膝に載せて右手で弾く。